

Religia (Mal)Toleremo

En preskaŭ la tuta mondo oni kalkulas la jarojn laŭ la oficiala naskiĝjaro de Jesuo Kristo, eĉ se oni ne uzas la esprimojn “antaŭ Kristo” kaj “post Kristo”. Multaj nekristanoj preferas diri ekzemple “antaŭ nia erao”, “de nia erao”, sed la fakto estas, ke oni akceptas la naskiĝjaron de Jesuo Kristo kiel limon, kiel jaron nul.

Laŭ la kristana kredo Jesuo naskiĝis dum la nokto inter la 24-a kaj 25-a de decembro. Pro tio en multaj landoj la 25-a estas festotago, kaj la hodiaŭa vespero estas konata kiel Sankta Vespero, dum kiu oni jam festas.

La kristanoj opinias, ke Jesuo Kristo estas la principo mem de Amo.

En la Esperanta “Londona Biblio” legeblas liaj jenaj vortoj:

“Amu vian proksimulon kiel vin mem. Pli granda ol ĉi tiuj ne estas alia ordono.” (Marko 12, 31)

Ankaŭ en la aliaj religioj gravas idealoj kiel amo, frateco, senperforto.

Tamen, kontraŭe al tiuj principoj kaj celoj, ekzistis kaj ekzistas multaj konfliktoj, agresoj kaj militoj kaŭze de religioj. “Kaŭze de religioj” ne signifas, ke la religio estas la kaŭzo; la kaŭzo estas la netoleremo, la maltoleremo, la fanatismo de la kredantoj.

Rilate la pasintecon oni povas citi:

- la persekutojn suferitajn de la unuaj kristanoj;
- poste la perfortajn kampanjojn de disvastigo de Kristanismo inter la indiĝenoj fare de la Katolika Eklezio, unue en Eŭropo, pli malfrue en Ameriko kaj Afriko;
- en la 12-a kaj 13-a jarcentoj la perfortojn de la krucmilitoj;
- post la Reformacio la intrakristanajn militojn kaj perfortajn agresojn;
- la persekutojn suferitajn de la judoj en multaj landoj ekde la Mezepoko ĝis nun.

Fakuloj asertas, ke religiaj diferencoj tre malofte estas la kaŭzoj de perfortaj konfliktoj, ke la veraj kaŭzoj plejofte estas luktoj por politika potenco, por naturaj resursoj, por hegemonio de unu etnio super aliaj. Tamen religiaj diferencoj povas pliakrigi la konfliktojn.

Fakto estas, ke nuntempe okazas perfortaj religiaj konfliktoj en pluraj partoj de la mondo, ekzemple:

- inter islamanoj kaj kristanoj en Bosnio, Nigerio kaj Sudano;
- inter islamanoj kaj koptoj en Egiptio;
- inter hinduoj kaj islamanoj en Kaŝmiro kaj en la Hinda Unio (Barato);
- inter budhanoj, hinduoj kaj islamanoj en Srilanko;
- inter islamanoj, kristanoj, judoj kaj druzoj en Libano;
- inter budhanoj, islamanoj kaj kristanoj en Birmo;
- inter katolikoj kaj Protestantoj en Norda Irlando.

(Laŭ <https://www.spektrum.de/lexikon/geographie/religionskonflikte/6631>)

En Birmo estas – surprizige – la budhanoj (en kies religio senperforto estas gravega principo) kiuj atakas kaj mistraktas islamanojn.

Aliflanke estas sciite, ke multaj fanatikaj islamanoj agresas la kredantojn de aliaj religioj kaj deziras disvastigi Islamon pere de terorismo.

Ĉio tio estas malbonega, bedaŭrinda, kaj suferigas multajn homojn.

Kion la mondo bezonas i.a.? Toleremon, ĝeneralan toleremon, do ankaŭ religian toleremon.

Pro tio ekzistas ekde 1995 Internacia Tago por Toleremo, la 16-a de novembro. En 1995 185 membroŝtatoj de UNESKO subskribis deklaron pri principoj koncernaj al toleremo, principoj kiuj ebligu pacan kunvivadon de homoj de diferencaj kulturoj kaj religioj.

En Brazilo, konata kiel katolika lando, sed fakte multreligia lando (en kiu kredantoj de diversaj protestantaj aŭ evangeliaj eklezioj jam formas proksimume 30% de la enloĝantaro), oni starigis "Nacian Tagon de Lukto kontraŭ Religia Maltoleremo" (kiu estas la 21-a de januaro), ĉar ankaŭ en Brazilo tia maltoleremo ekzistas kaj eĉ pligrandiĝis dum la lastaj jaroj. Suferas agresojn ĉefe kredantoj de religioj de afrika deveno, sed ankaŭ katolikoj, protestantoj, spiritistoj kaj judoj (laŭ <http://www.palmares.gov.br/?p=53045>).

Ĉiuj homoj estu toleremaj, aparte ni esperantistoj, kiuj havas la oportunon konatiĝi kun homoj de aliaj kulturoj kaj religioj.